# Ĝenerala Asembleo de Triesta Esperanto-Asocio

## Dimanĉon la 1an de februaro 2015

## Agadraporto de la sekretario por la 2014a jaro

- Partopreno de TEA-anoj en la **Projekto Grundtvig**: ELLOKE TUTMONDEN: LA DEFIOJ DE VOLONTULADO, kies unua seminario okazis ĝuste en Triesto, de la 25a ĝis la 27a de oktobro 2013. Dum la jaro 2014a anoj de TEA ĉeestis la jenajn seminariojn: en Tuluzo, Francio, 20-24 de februaro; en Pitlochry, Skotlando, 6-8 de junio; en Visaginas, Litovio, 27-29 de aŭgusto; en Bjalistoko, Pollando, 10-12 de decembro. La venonta seminario okazos en Vercelli, fine de marto 2015.
- Eldono de la turisma libreto en Esperanto "Triesto, inter Karsto kaj Maro - Magiaj itineroj", financita de la Triesta Provinco. La gvidilo enhavas 108 paĝojn, kun koloraj fotoj.
- En majo, organizado de la Printempaj Karstaj Tagoj, ekskursoj al Karsto kun ĉiĉeronado.
- Konkurso pri pentrado, en kiu partoprenis 19 pentristoj, per 20 verkoj. Sur la verkoj oni – laŭ la regularo – devis skribi frazeton en esperanto kaj alia lingvo, elektita de la aŭtoro. La ekspozicio inaŭguriĝis la 26an de novembro, dum la premiado okazis la 5an de decembro. Estis disdonitaj 4 monpremiojn. Partoprenis italoj, slovenoj kaj aŭstro.
- **8-11 oktobro** - Estis organizita de Kroata Esperantista Unuiĝo (Marija Belośeviĉ) kunlabore kun Kroataj studoj de la Zagreba Universitato kaj Kroata Burglanda Centro Vieno la Internacia Konferenco: "Dialekta Literaturo – Modelo por la nacia literaturo". En ĝi kontribuis per prelegoj Edvige Ackermann kaj Elda Doerfler.

**Pri ekstera informado:**

- Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj kaj ĵurnaloj.
- **Alirprogramoj** de RADIO UNO: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 8 elsendoj pri diversaj temoj. *(10 januaro; 7 februaro; 7 marto; 16 julio; 18 aŭgusto; 15 oktobro, 19 novembro; 29 decembro*).

**Ĝeneralaj informoj:**

**TEA-Bulteno**: kiel kutime ĝi aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

*Elda Doerfler*

Elda Doerfler